



**PERSISTA
ESPERANTIGO
DE LIAOZHAI**
(Guozhu 1994-03-20/ 2010-02-03)

◇ Ekago post trifoja pensado

Ke mi ekdeziris esp-igi la faman mirlibron Strangaĵoj de Liaozhai de Pu Songling, tio okazis ja antaŭ jardekoj, en la komenco de 70-aj jaroj de la lasta (20a) jarcento. Tiam la plej granda malfacilo por mi estis "volo mamuta, kapablo liliputa." Kaj, pro manko de memfido, mi kuraĝis diri tion al neniu, timante min suspektita kiel homo senprudenta kaj tro pretenda. Mi faris la decidon nur nepublika, kaŝita en mia propra koro: pene lernu, altigu mian klerecon, kaj kredas ke mi certe progresos kaj iutage sukcesos.

Nun, post komenco de mia laboro esp-igo, verŝajne mi ĉiam frontas al problemo, kiun mi nepre devas respondi en la nova epoko, en la nuna tempo: Se mi jam bone scias anticipe pri tio, ke per la esp-igo de Liaozhai mi certe gajnos nenian profiton kaj mankas ŝanco por eldoni mian esp-igon, kial do mi ankoraŭ voluntas persisti en la tradukado? Sen klara respondo pri tiu demando, en kuranta epoko mi versimilas al moderna Donkiĥoto, azene malsaĝa.

Fakte tio estas problemo koncerna al koncepto pri vivo, koncepto pri valoro. Homo devas havi volon. Malsamaj homoj havas malsamajn volojn. El la bonvirtuloj, ĉu antikvaj aŭ nuntempaj, verŝajne ne multaj adoras la doktrinon ke mono superas ĉion.

Ekskluzive per la forto de mono oni neniel kaj

neniam sukcesos atingi la noblan animstaton ke“ nesubigebla per potenco, ne koruptebla per riĉeco kaj neŝancelebla per malriĉeco”.

La prizono humida, obskura,

por mi estas loko plezura.

Kvankam la saĝuloj jam foriris,

tamen ĉiam virte min inspiris.

Tiel kantante, la granda patrioto Wen Tianxiang (1236-1283) tenis sin ja per fidela konvinkigo.

Mi estas ĉiam konvinkita de jenaj sentencoj:

1.Spirito estas grava por homo. Ju pli inundas la mamonismo, des pli sobra tenu nian cerbon. Staru kun rekta spino, ne falu kun kapklino!

2.Homo devas ion fari. Homo naskiĝas ja por iu granda afero. Homo foriros post faro de granda afero. Engels diris: "La plej alta stato de homa vivo ja estas por ion fari."

3.Grava estas memkono. Sciu pri siaj propraj avantaĝoj kaj malavantaĝoj. Sciu pri la tempo kaj spaco kiam kaj kie vi troviĝas, kaj sekve sciu pri kio nefarenda, nefarinda, tiel ke vi povas akiri sukcesojn utiligante viajn avantaĝojn kaj evitante viajn malavantaĝojn.

◇ Devkonscia sinteno

Diskonigi la elstarajn kulturajn heredaĵojn de sia propra nacio al la mondo, por ke ili fariĝi komuna spirita riĉaĵo de la tuta homaro, tio estas la neevitebla morala devo de ni ĉinaj esp-istoj. Necesas al ni la spirito

senhezite plenumi la farendan taskon.

En la rondo de Esp-o, nombro de profesiaj esp-istoj ĉiam estas relative malpli multaj. Ni povas rimarki, ke multaj esp-istoj inkluzive D-ron Zamenhof, ekokupis sin per granda laboro plej ofte ne pro la ordono de sia profesia superulo. Tial, neprofesiaj esp-istoj devas havi konscian respondecon pri sia historia misio kaj la animstaton preni la mondan aferon sia tasko. Tio ankaŭ konformas al la spirito de ĉinaj batalantoj "ne forgesi zorgi patrolandon eĉ en plebaneco."

◇ La reĝo inter noveloj

Rilate al la elekto de temo, nature, oni povas sin okupi per nesamaj fakoj laŭ nesamaj persona cirkonstanco kaj tempo. Mi ŝatas ĉinan antikvan literaturon kaj deziras konigi ties famajn verkojn al legantoj tra la mondo. Tamen, dum multaj jaroj mi havas nur erojn da libera tempo sub mia dispono, tial mi nur povas traduki mallongajn pecojn. Tiel, laŭ la tri kriterioj de "famaj, mallongaj pecoj, el la antikva ĉina literaturo" konsekvence la "Stranagaĵoj de Liaozhai" estiĝas la plej bona rezulto por mia elekto, ĉar ĝi ja ĝuas la famon kiel "la reĝo inter ĉinaj noveloj". La tuta libro konsistiĝas el 12 volumoj kun 496 mirrakontoj, kiuj povas ekzisti kiel sendependaj unuopaj pecoj, kaj ankaŭ kolektive kiel kompleta majstra verko. Do tre taŭga por mia traduko per temperoj kaj akumulado en longaj jaroj.

◇ Erupto el profunda akumulado

Por konstrui gigantan domegon, ne sufiĉas nur aspiro. Por realigi la grandan celon, estas nemankigeblaj la triopo de movforto, kapablo kaj persistemo. Tial, ekde la 70-aj jaroj de la 20-a jarcento mi preparis min per du longaj jardekoj por ke la preparado estu kiel eble sufiĉa.

1. Bonvirto.

Ĉinoj ĉiam alte taksas bonvirton. En rondo de ĉina uŝuo (luktarto) oni pledis por helpado al senfortuloj. En rondo de kuracistoj oni pledis por savado de malsanuloj. Ankaŭ en rondo de tradukistoj oni pledis por bonvirto de tradukistoj.

Laŭ mia kompreno, tio ĉefe koncernas du flankojn: Sen profitema ĉaso de famo kaj ĉiam serioza en sia laboro.

Nome,

*eltenu pruvon de jardeka sidad' malrava,
kaj skribu vian verkon neniam senenhava.*

Sen tia konduto oni ne povas ellabori bonan tradukaĵon.

Ĉinaj antikvuloj instruis ke,

*por perfektigo de verskapablo ĝis maturo,
atentu antaŭ ĉio pri virta sinkulturo.*

Do, la primara atentigo ankaŭ direktiĝas al bonvirta memkulturo.

2. Kapablo

Kompetenta ĉina tradukisto devas havi tri kapablojn: pri la ĉina lingvo, pri la fremda(j) lingvo(j), kaj pri la faka scio.

2.1. Pri la ĉina

Por traduki la mirlibron Liaozhai, ne sufiĉas posedi la

ĉinan lingvon je ĝenerala nivelo. Necesas posedi scion ankaŭ de la antikva ĉina lingvo. Alie, vi eĉ ne povus kompreni la originalon, kiel vi komencos la tradukadon? Ĉi tie koncernas precipe pri la antikva ĉina kulturo. Sen tia scio tre facile okazos la fenomeno: kvankam la tradukanto konas ĉiujn literojn de la originala teksto, tamen vi ankoraŭ povas kompreni nenion aŭ grave miskompreni la veran sencon. Rigardu la subajn ekzemplojn (antaŭ la dupunkto estas laŭlitera esprimo de la orininala vorto, post la dupunkto estas ĝia vera senco):

Baixia(白下): antikva nomo de la urbo Nankino.

daling(大令): guberniestro, neniom koncerna al la angla vorto "darling".

nevorti(不字): ne edziniĝi.

dua tago(二天): reedziniĝi.

lampfajro(灯火): lernopago.

manbabilo(手谈): ŝakludi vejĉion.

orienta lando(东国): Shandong-provinco.

homvoji(人道): geiĝi.

mil-manpreno(千把): malaltranga oficiro (ne numeralo).

samjaruloj(同年): sukcesintoj en sama ekzameno. Ne sam-aĝ-uloj.

2.2.Pri la fremda(j) lingvo(j)

Ĉefe pri la cel-lingvo de la traduko, nome, Esperanto. La tradukanto devas havi la kapablon reaperigi la aspekton kaj stilon de la originalo. Des pli

bone, se li scipovas ankaŭ aliajn fremdajn lingvojn por legi referencajn materialojn en aliaj lingvoj tiel ke lia vidkampo kaj penso estos pli vasta kaj larĝa dank' al la ensorbo de nutraĵoj el aliaj fontoj. Tamen oni ankaŭ devas bone sindeteni por eviti negativan influon kaj miskondukon de la alilingvaj tradukoj.

2.3. Pri la faka scio

Krom la tradukarto, la tradukanto devas bone kompreni kion li tradukas. Tiu regulo validas ne nur je la traduko de materialoj de naturaj, sed ankaŭ homaj sciencoj kaj literaturo. Ekz-e, tiu, kiu tradukas la romanon <Ruĝdoma Songô>, devas kompreni la fakan scion de ruĝologio. Kaj tiu, kiu tradukas la romanon <Umeo en la Ora Botelo>(Jin Ping Mei), devas kompreni la fakan scion de orologio. Same, tiu, kiu tradukas la novelaron <Strangaĵoj de Liaozhai>, devas kompreni la fakan scion de liaozhailogio aŭ pusonglinglogio.

Tamen, neniu homo estas denaska ĉiosciulo. Tial, necesas senĉesa lernado, kiu faros vin kompetenta fakulo.

3. Materialoj

Oni ne povas akiri la necesajn materialojn je unu tago aŭ unu loko. Necesas multjara akumulado. Ni devas zorgeme kaj pacience kolekti ĉirkaŭ la tasko tri flankajn materialojn.

3.1. Norma originalo

Estas tre ofte vidata fenomeno, ke por unu sama verko

de antikva ĉina literaturo ekzistas diversaj eldonoj aŭ versioj, kies tekstoj estas ne tute samaj, diferencaj per avantaĝaj nuancoj unu ol la aliaj. Tial, la sobra tradukanto elektas neniam arbitre, antaŭ ĉio li devas fari zorgeman komparadon inter la kandidataj kaj poste elekti el ili taŭgan eldonon kiel norman originalon, laŭ kiu li faros la esperantigon. Ekz-e, se ni rigardus nur laŭ la nombro de volumoj de Liaozhai en unu libro, ekzistas jam tiel diversaj (resume naŭ) versioj respektive kun 1, 6, 8, 10, 12, 15, 16, 18, 24 volumoj.

3.2.referencaj materialoj

Estas en tri grupoj

3.2.1. Ĉiuj aliaj eldonoj krom la elektita norma eldono. ekz-e: <Eldono kun koncentritaj komentarioj, koncentritaj glosoj kaj koncentritaj kontroloj (mallongige: Tri-Koncentrita Eldono) de Strangaĵoj de Liaozhai>, <Manskribita kopio de Zhu-xue(Neĝmulda Kabineto)>, <Manskribita kopio en 24 volumoj>, <Stranga Historio>, <Eldono kun glosoj>, <Eldono kun simplaj glosoj>, <Eldono de elektitaj mirrakontoj>, <Eldono de zorge elektitaj mirrakontoj>, <Ilustrita eldono> ktp.

3.2.2. Aliaj tradukoj

Diversaj tradukoj en plena aŭ elektita teksto per la ĉina parola lingvo.

Diversaj tradukoj en aliaj fremdaj lingvoj.

Unuopaj esp-igoj jam aperintaj.

3.2.3. Koncernaj libroj, periodaĵoj kaj studfruktoj

Ekz-e: Aprecoj pri Mirrakontoj de Liaozhai, Rakontoj en vulgara lingvo, Kolekto de rerakontitaj pecoj de Liaozhai, intrigoj de televidaj teatraĵoj, bildlibroj, karikaturoj, kolekto de la revuoj <Studo pri Pu Songling>, monografioj, ĵurnalaj eltranĉoj ktp.

3.3. Ilolibroj

Estas du specoj: por komuna aŭ speciala uzoj, kiuj helpas por bone kompreni la originalon kaj trafe esprimi en traduko.

Ekz-e: diversaj vortaroj unulingvaj (ĉina, Esp-a, PIV) aŭ dulingvaj (Ĉina-Esperanta, Esperanta-Ĉina) kaj leksikonoj; < Speciala Vortaro pri la Ŝtatoficista Sistemo en Ĉinaj Dinastioj > (por konsulti pri malnovaj ŝtatoficistaj titoloj); < Konciza Kronologia Tabelo de Ĉina Historio > (por konsulti pri la nomoj de la imperiestraj reg-periodoj kaj la koncernaj jaroj laŭ sunkalendaro); < Faka Leksikono de Liaozhai > (por konsulti pri literaturaj aŭ historiaj aludoj, leĝoj kaj regularoj kaj scioj de ceteraj vortoj); kaj la tradukanto ankaŭ povas memkompili specialajn ilolibrojn por sia propra uzo. Tiuj materialoj kolektiĝas el diversaj kanaloj: ĉu per aĉeto, aŭ prunto, aŭ propra mankopiado, aŭ donaco far amikoj, ĉiuj devenas malfacile kaj kun kaŝitaj kortuŝaj travivaĵoj, plenaj de ĝojo aŭ amaro rememorindaj.

Ekz-e: kara amiko Wang Chongfang pruntedonis al mi (eĉ sen deviga redona limdato) anglan eldonon de

Liaozhai tradukita far A.Giles en 1908. Kara Jariĉ donacis al mi libron <Elektitaj mirrakontoj de Liaozhai> angligitan de ges-roj Yang Xianyi kaj Gladys Yang, eldonitan 1981 en Pekino. S-ano Even donacis al mi tre utilan ilolibron <Faka Leksikono de Liaozhai>. La rusan eldonon de Liaozhai eldonitan en 1954 mi mem aĉetis el la Ŝanhaja Brokanta Librovendejo. La libro <Manskribita kopio de Zhu-xue(Neĝmulda) Kabineto>, estis aĉetita por mi far mia kara Panjo; la imponan libron <Tri-Koncentrita Eldono de Liaozhai> mi sukcesis aĉeti nur ĝis 1992 en Shandong-provinco, la memor-sigelo sur ĝia frontpaĝo estis farita en la Muzeo de Pu Songling en la Vilaĝo de Pu-familio, kien mi pie vizitis, do kun centprocenta aŭtoritateco. La plej dika <Plena Liaozhai en Prola Lingvo> en 1571 paĝoj estis aĉetita 1991 en Kantono kiam mi kun Sceto kune vizitis al la librejo sur la Popola Strato.....

Post multjaraj sinpreparo, ekzercado de varmigo, provtraduko la kuraĝo, memfido, kapablo, spertoj kaj materialoj de la tradukanto ja kreskas kun ĉiu tago, fine okazis rompo de rekordo per la erupto post profunda akumulado.

◇ Celante alten

Dum la tradukado, mi elmetis ses postulojn por la kvalito. Eĉ se mi ne povas plenumi komplete en la komenco pro limigo de mia kapablo kaj sperto, mi prenu ilin mia celo al kiuj mi strebu kun aspiro.

1. Norma

Selektante la ĉinan originalon, mi postulas ke la eldono estu perfekta je la subaj flankoj.

(1) Kompleta enhavo. Okazis nenia fortranĉo al la originalo per ajna motivo.

(2) Norma teksto. La nombro, varioj de teksto, frazodividoj kaj la interpunkcio estu konformaj al la normo kaj seneraraj.

(3) Kun studaj fruktoj. Ekz-e: Kiel dividi la volumojn? Kiel difini la nombron de la pecoj? Kiel vicigi kaj prinoti? Ĉio estu racia kaj konvinka. Por doni fidindan originalon kaj helpojn al la tradukanto.

La ĉina originalo, kiun mi fine elektis, estas la <Strangaĵoj de Liaozhai en Plena Teksto kun Novaj Glosoj> eldonata de la Popola Literatura Eldonejo en 1989, ellaborita sub gvido de Profesoro Zhu Qikaj kiel la ĉefkompilinto. La tuta kompleto konsistas el tri kajeroj po 4 volumoj.

2. Ĝisfunda

Kompreno pri la originalo estu ĝisfunda, sed ne nur supraĵa. La tradukanto devas peni por koni la interne esencan signifon. Sciu, ke en la ĉinaj antikvaj verkaĵoj tro ofte legiĝas eŭfemismaj parolturnoj. Ekz-e, en la antikva ĉina lingvo oni tiel diras “estas senspuraj kaj la printempaj montoj kaj la aŭtuna akvo”, sed ne diri “estas videblaj nek la okuloj nek la brovoj”; per “qutan (laŭ sanskrita prononco)” nomi “bonzon”; per “lotusfloro” nomi “belulinon”; per “pendigi arkon”

esprimi “naskiĝi”, per “sufeng” esprimi “riĉa”.....ĉiuj ĉi tiuj estas nesamaj ol la vortoj en la moderna ĉina lingvo.

3. **Fidela**

Traduko estu fidela, flua kaj delikata, povante redoni la stilon de la originalo.

En Ĉinio troviĝas tiaj majstro-verkoj, ke ili ampleksas en sia unuopa libro jam ĉiujn beletrajn formojn kiel de poemoj ritma kaj fiksforma, ario, odo, kanto, prozo libera kaj paralela...ktp. Se la tradukanto volas redoni ĉiuflanke la belojn de originalo, tio estas duoble malfacila tasko, vere malfacile plenumbla.

4. **Kompleta**

La esperantigo estas farita por neĉinaj legantoj. Tial, krom la ĉefparto el la mirrakontoj, la libro estu kun apendico el materialoj kiel eble kompletaj, ekz-e enkonduko, indekso, glosoj, akcesoraĵo, postskribo de tradukinto, portreto de la aŭtoro Pu Songling, fotoj de la originalaj folioj, enhavolisto ktp, tiel ke la tuta libro servus kvazaŭ eta enciklopedio de Liaozhai.

5. **Abunda**

La signifon de laboro super Liaozhai ne limigu nur je la traduko. Krom la esp-igo, ni celu ankaŭ pri abunda kromprodukto. Ekz-e notoj dum la esp-igo, spertoj, disertacioj ktp.

6. Delikata

Ni revas ke la aperonta libro havas delikatan eksteran aspekton, fajnan preson kaj belan dekoracion kiu plaĉas al legantoj.

◇ Pena serĉado

Esp-igo de verkoj en la antikva ĉina lingvo havas apartajn malfacilojn. Mi elektis 12 temojn por studi en praktiko, akumuli kaj resumi la spertojn.

1. Titoloj

El la 496 mirrakontoj de Liaozhai, tiuj kun homa nomo kiel sia titolo, okupas pli ol 60% en la tuta libro. Se mi ĉie tradukus ilin per transskribo de la Hanlingva Fonetika Alfabeto (HFA), tio egalas netraduko por neĉinaj legantoj. Post esploro, mi dividis ilin en 8 malsamajn grupojn kaj tradukis respektive laŭ nesamaj manieroj.

Ekz-e: [vicnumero/ titolo en HFA/ titolo en la ĉinaj ideogramoj/ esp-igo]

022. Jiaona/ 娇娜/ Fraŭlino Jiaona,

038. Wang Cheng/ 王成/ Wang Cheng kaj Lia Koturno,

039. Qingfeng/ 青凤/ Fraŭlino Qingfeng,

048. Yingning/ 婴宁/ La Ridema Yingning,

069. Lianxiang/ 莲香/ Fraŭlino Lotusaromo,

070. Abao/ 阿宝/ Fraŭlino A-Bao,

106. Wang Shixiu/ 汪士秀/ Piedpilka Ludo de Wang Shixiu,

111. Gong Mengbi/ 宫梦弼/ Onklo Gong Mengbi
ktp

2. Propraj nomoj

Personaj nomoj, lokaj nomoj kaj nomoj de libroj. Ekz-e

062. Hu Si Jie/ 胡四姐/ Kvara Franjo Hu,

012. Wang Liulang/ 王六郎/ La Fiŝisto kaj Lia Amiko,

059. Geng Shiba/ 耿十八/ La Reviviĝo de Geng Shiba,

055. Zhang Lao Xianggong/ 张老相公/ Maljuna
Sinjoro Zhang,

261. Yishui Xiucui/ 沂水秀才/ Instruitulo de Yishui;

094. Jinling Nüzi/ 金陵女子/ Virino de Jinling,

229. Yuhang/ 余杭/ Yuhang-gubernio,

051. Jixia/ 稷下/ Jixia(Ĝjiŝja) (nuntempa Linzi. —
tra.),

034. Jiangnan/ 江南/ arkaika ellasita;

005. Guangming Jing/ 光明经/ la sutro Lumo,

022. Langhuan Suoji/ 琅环琐记/ Notoj pri Felando
Langhuan(Langhuan)...ktp

3. Titoloj de ŝtatafĉistoj / nomoj de feoj

Ekz-e : [vicnumero de la fonto/ en HFA/ ĉinaj
ideogramoj/ esp-igo]

073. biejia/ 别驾/ mandareno (traduki per vorto kun
pli vasta signifo)

033. yi zai/ 邑宰/ guberniestro,

022. sili/ 司李/ ĉefjuĝisto,

021. tianguan/ 天官/ ministro ;

001. chenghuang/ 城隍/ urba dio,

040. Qing Di/ 青帝/ la Blua Imperiestro ...ktp.

4. Vortoj en la oficistiga sistemo tra ŝtataj ekzamenoj

Ekz-e:

394. tongshi/ 童试/ primara ekzameno,

013. junshi/ 郡试/ ekzameno okazanta en la provinca ĉefurbo,

339. xiangshi/ 乡试/ provinca ekzameno,

478. huishi/ 会试/ metropola ekzameno;

031. youpan/ 游泮 [laŭlitere: naĝi en lago antaŭ la gubernia lernejo]/ sukcese trapasis la gubernian ekzamenon,

047. liwei/ 礼闈(=会试)/ metropola ekzameno,

031. jie nangong/ 捷南宫 / sukcese trapasis la metropolan ekzamenon ;

167. gongsheng/ 贡生/ rekomendita studento,

006. xiaolian/ 孝廉 / trapasinto de provinca ekzameno.....ktp

5. 古代量词 antikvaj mezur-unuoj

如:

shi/ 石/ kapacite 1 shi = 10 doŭoj, peze 1 shi = 120 ĝin-oj,

dou/ 斗/ 1 doŭo = dekalitro,

duan/ 端/ peco,

xi/ 袭/ kompleto,

guan/ 贯/ monermilo,

xun/ 寻/ = ok futoj,

jun/ 钧/ = 30 ĝinoj,

wei/ 围/ ĉiraŭbrakumo.....ktp.

6. Sanskrito

Ekz-e:

lanruo/ 兰若/ templi,
luocha/ 罗刹/ demono Jakŝa rakŝo、
Yecha/ 夜叉/ Jakŝa、
tanyue/ 檀越/ sinjoro patrono,
yuanji/ 圆寂/ (bonzo) forpasi,
yanluo/ 阎罗/ Hadesa Reĝo,
youpoyi/ 优婆夷/ budaisma kredantino,
youposai/ 优婆塞/ budaisma kredanto.....ktp.

7. Versaĵoj kaj paralela prozo

Ekz-e: diversaj poemoj, rimaj aŭ fiksfarmaj, ario,
verdikto ktp.

8. Literatura aŭ historia aludo

Ekz-e:

Linqiong/ 临邛/ loknomo aluda pri kromvirino,
wei Wenjun/ 为文君/ vivi vidvine,
jieyuhua/ 解语花/ la floro de saĝo,
yuanshan furong/ 远山芙蓉/ virino, kies belaj brovoj
similas al malproksimaj montkrestoj,
tonĝin qiannv/ 同心倩女/ fideda amatino.....ktp.

9. Dusencaj vortoj kaj vortludoj

Ekz-e:

cifu/ 雌伏 (subiĝi)/ vesti sin per virina vesto kaj ĉiam
resti en fermita domo,
miaoshuai/ 眇帅(unuokula marŝalo)/ virilo,
Chanfu zai/ 单父宰 (guberniestro Chanfu)/ kastrita
patro,
da gua/ 大瓜 (granda melono)/ putino,

xiao quan/ 小犬/ hundeto.....ktp.

10. Seksaj aŭ erotikaj vortoj

Ekz-e:

shi/ 势/ peniso,

huachi/ 华池 (buŝo)/ piĉo,

niaodao/ 鸟道 (vojo de birdo)/ vagino,

xiani/ 狎昵/ intimi, amori,

xiuyanhao/ 修燕好/ geedziĝi,

tengjinweiqi/ 藤津伪器/ postiĉa kaco,

laoai zhi mu/ 嫖毒之目/ esti rigardata kiel kacegulo,

tiyun-youyu/ 殢云尤雨/ ĝui delicajn intimaĵojn,

chunfeng yidu/ 春风一度/ post momento da amorĝuo,

diandao yichang/ 颠倒衣裳/ trivialaj sensplezuroj,

duanxiu zhi pi/ 断袖之癖/ emo al pederastio.....ktp

Tiaj vortoj estas vere malfacile tradukeblaj. Konsultante la principojn, kiujn uzis s-roj Zhu Shenghao(1912-1944) kaj Liang Shiqiu(1903-1987) dum la ĉinigo de la plena kolekto de dramoj de Ŝekspiro: aŭ eŭfemisme por eleganta traduko, aŭ rekte por fidela konservo de la originala stilo.

11. Specialaj aferoj

Ekz-e:

jiji/ 及笄/ (knabino) atingi 15-jaraĝon,

yueling/ 月令/ monata ario,

tunashu/ 吐纳术/ spirĵongla sanigarto,

changsangshu/ 长桑术/ kuracarto,

shuilu daochang/ 水陆道场/ diservo (por savi fantomojn),

zou wuchang/ 走无常/ mediuo-sorcisto.....ktp.

12. Animalaj kaj vegetalaj nomoj (inkluzive fikciajn)

Ekz-e:

zhupolong/ 猪婆龙/ Porkin-drako (Jangzi-krokodilo) ,

jinmao hou/ 金毛吼/ orhara leonhundo;

shuimangcao/ 水莽草/ shuimang-herbo,

qiushu/ 楸树/ ĉina katalpo.....ktp.

◇ Labori kun persisteco

Mia esp-igo de Liaozhai trapasis sinsekve 4 periodojn.

1. **Prove**

Ekde 1971, mi komencis esp-igi prove per mallongaj pecoj. Ekz-e: <Magiaĵo> (087. vic-numero de pa peco), <Homo Nomata Diao(Ruzo)> (370), <Vulpo en Vazon> (027) kc. Tiu komenca periodo daŭris pli ol dek jarojn, do sufiĉe longa prov-ekzercado.

2. **Laŭplaĉe**

Ekde 1985, mi esp-igis tiujn pecojn, kiuj ne nur interesas min, sed ankaŭ taŭgas je mia kapablo. Okaze de la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto (1985. Kunming), Huangshi-a Esperanto-Asocio eldonis kajeron <Strangaĵoj de Liaozhai> el 30 paĝoj en ofseta preso, kun antikvaj ilustraĵoj kaj kvin mirrakontoj <Priŝtelo de Persiko> (013) kc. La nomita kajero estis disdonacita en la kongreso.

3. **Elekte**

Ekde 1990. Mia kara panjo forpasis en la printempo tiujare. Kun larmoj mi faris esp-igon de Liaozhai ĉe ŝia malsanlito. Ŝi ĉiam subtenas min daŭrigi tion ĝis la fino.

Tiam mi jam havis liston de elektitaj pecoj, kaj mi esp-igis laŭ tiu nomlisto ekz-e:

<La Grilo> (137), <Songô pri Lupoj> (305), <La Taoisto de Laoshan-monto> (015) ktp.

4. Plene

Ĉar venis al mi informo, ke la eldonejo ĈEE jam invitis alian s-anon traduki elektitajn mirrakontojn de Liaozhai. Tio signifas ke dum videbla proksima tempo ili ne povas aŭ volantas havi ripetan planon. Tiu informo kontraŭe instigis min turni al la nova celo de plena esp-igo de Liaozhai, kun decidemo "forĝi glavon per jardeko". Do, ekde 1991, mi komencis la plenan esp-gon laŭvice de la unua mirrakonto de la unua volumo de Liaozhai. Tiu laboro nun (1994) ankoraŭ normale daŭras. [Noto: la unua malneta traduko estis elfarita en 1995. La plena enkomputiliga tajpado finiĝis en 2006.]

"Ho,ĉesu!" bonkore la homoj admonas—

"Ne ĉesu, ne ĉsu!" en kor' al mi sonas.

Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita

Ĝi estas, la voj' elektita.

◇ Fontoj de forto

Kio subtenas min, ankoraŭ estas la idealo, modeloj, amikeco, kompreno kaj prizorgo. Mia intima amiko Shi Chengtai rakontis al mi pri la esp-igo de **Dekamerono** far G.Waringhien. Ekde la jaroj antaŭ la Dua Mondmilito Waringhien jam komencis esp-igi. Ĝis la tempo kiam li forpasis en 1991, li jam ellaboris la esp-igon de la unuaj <**Tri Tagoj**>. Nun Perla Martinelli, la ĉefredaktoro de

Literatura Foiro daŭrigas la stafetan tradukon de tiu ĉi majstra romano.

Kiam arde iras la Dua Mondmilito, Hilda Dresen esp-igas poemojn en malgranda kabano. Siatempe, ekster ŝia fenestro estas aeratakoj, alarmoj, bombaj eksplodoj, tamen spite al tio ke Parco vagas tuj proksime, Hilda Dresen ankoraŭ aplombe daŭras sian esp-igon en la ĉambro.

Tio pruvas la diron, ke granda volforto naskiĝas nur por la granda celo.

Mi scias ankaŭ la alian mirhomon, ke dum multaj jaroj la japana esperantisto s-ano Ludovikito vivis ĉiam ermite, okupante sin per la kompilado kaj eldonado de la Plena Verkaro de Zamenhof (PVZ). La Ĉielo favore rekompencas al la diligentulo, fine rezultis la frukto de sukcesa publikigo de la tuta kolekto en 47 volumoj kun 21 miloj da paĝoj!

Same ermite laboras ankaŭ Seimin. Dum dek jaroj li profundiĝis en la esp-igo de la romano <**Ruĝdoma Songô**>, donante al mi videblan modelon lernindan.

Frue antaŭ pli ol jarcento jam aperis traduko de mirrakontoj de Liaozhai. Ĝis nun resume estas pli ol 30 tradukoj en 21 fremdaj lingvoj. Tamen, ankoraŭ mankas la plena esperantigo de Liaozhai.

Rusa ĉinologo Vasili Mihajlovic Aleksejev dum sia tuta vivo persiste rusigis mirrakontojn de Liaozhai, liaj tradukoj distingiĝis kiel elitaj inter diversaj fremdlingvaj eldonoj.

La angligo de Liaozhai far la brita ĉinologo H.A.Giles, eldonita en 1908, enhavas 164 pecojn, tiu sumo superas rekordon en ĉiuj okcidentaj lingvoj. Laŭdire Ĉinio intencas renovigi la rekordon kaj planas organizi specialistojn por ellabori plenan angligon de Liaozhai.

Pri mia esperantigo de Liaozhai zorgas multaj esperantistaj amikoj el provincoj Sichuan, Hubei, Guangdong, Anhui, Interna Mongolio, Shandong, Fujian, Jiangsu kaj Pekino kc. Pro la spaclimigo mi ne povas vivigi ĉitie iliajn nomojn. Tamen mi kore dankas ilin pro la kompreno, prizorgo kaj subtenoj. Dank' al ilia stimulo mi obstine persistis en la laboro kaj jam akumulis pli ol mil manskribajn paĝojn de la esperantigo. Mi volas ordigi ilin per komputilo, fari kelkajn printaĵojn por peti opinion kaj subtenon. Mi kredas, ke tiam okazos pli multaj kortuŝaj eventoj!

Homa vivo havas limon, dum la jaroj estas senlimaj. Personoj kun firma volo al transgeneracia stafeta kunlaboro de granda afero, faras maratonon antaŭ kaj post sia forpaso, donante oferan servon ĉiam al la homaro!

Fine, bonvole permesu min fini la skribon per modesta poemo:

Persista Esp-igo de Liaozhai

— laŭ ĉinesko Manjianghong*

(1994-03-20/ 2010-01-30)

Antaŭ dekoj/ da jaroj/ la ĵurhor
ankoraŭ/ freŝas ĝis nun/ en memoro:
Traduki plenan <Liao Zhai>/ por la patruja gloro,
spite al/ mil baroj, ek al/ laboro!

Sen sorta/ favoro,
kun arda/ adoro,
ĉiam persisti/ kun fervoro,
en transgeneracia/ stafeta kunlaboro
konkorde/ kun la genia/ aŭtoro!

* Manjianghong 满江红 Rivero Plenruĝa

ĉina fiksforna poemo el du strofoj po 11 versoj de
434,344,77,353 kaj 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ
rimaranĝo de xxa,xxa,xa,xxa/xa,xa,xa,xxa (x=senrima).

LA STRANGAĴOJ DE **LIAOZHAI**
Pu Songling (1640-1715)



ENKONDUKO
volumo 01
volumo 02
volumo 03
volumo 04
volumo 05
volumo 06
volumo 07
volumo 08
volumo 09
volumo 10
volumo 11
volumo 12



elĉinigis **guozhu**
guozhu cka
liaozhai-ekzamito

!!se luj fuŝaj simboloj vidiĝas,ne panikiĝu,nur ĉar via foliumilo ne subtenas gb-2312-ĉinlingvon.!!
!!vi povas glate vidi la parton en esperanto, foliumu tiun ĉi hejpaĝon prefere per IE60.!!

踔高志身,孤憤佳品,短篇之王,久負盛名,
寫鬼寫妖,高人一等,刺貪刺虐,入骨三分。

鳳靡中外,旷世絕倫,全文世評,多年苦辛,分卷上網,共賞奇文。

(注:“寫鬼寫妖高人一等,刺貪刺虐入骨三分。”为乾隆御題聊齋正序对联。)

<http://www.elperno.cn/elibro/liaozhai/index.html>